Österreichische
Nationalbibliothek

370.325-A

Esp-

370.325

BIBLIOTECA NACIONAL
MUSEO

ÖSTERREICHISCHE
NATIONALBIBLIOTHEK
370.325-A
Exp-

ZDEAU

Kial ili estas famaj ? ? ?

☆

TRADUKITA KAJ PLILONGIGITA

DE

Fernand DORÉ

Prezidanto de la Grupo Esperantista en Troyes

Prezo : 0 fr. 50

« ...Kial Doktoro Zamenhof estas fama ?... »

PARIS
LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO
15, RUE MONTMARTRE, 15 (1er arr.)

1907

Steiner

Kial ili estas famaj ???

GEORGES FEYDEAU

Kial ili estas famaj ? ? ?

☆

TRADUKITA KAJ PLILONGIGITA

DE

Fernand DORÉ

Prezidanto de la Grupo Esperantista en Troyes

Prezo : 0 fr. 50

« ...Kial Doktoro Zamenhof estas fama ?... »

PARIS
LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO
15, RUE MONTMARTRE, 15 (1er arr.)
—
1907

370.325 - A. Esp -

Ĉiuj rajtoj de traduko kaj represado
rezervitaj por ĉiuj landoj

Kial ili estas famaj ? ? ?

La homoj estas malspritaj, malspritaj, malspritegaj, ne parolu al mi pri tio ! vidu, mi suferas. Ha ! Pascal prave diris : « La homo estas kano ! » Jes, kano, tio estas afero malsprita, malsprita, malspritega.

Nu, rigardu la homon ; li, malforta estaĵo, li juĝas la aliajn homojn, li famigas ilin ! Kaj kiujn li elektas por tio ?... ĉiam konatajn homojn ! Estas ruze ! Tiel oni ne bezonas ilin serĉi !

Fine, kiuj estas tiuj famuloj ? Estas Franklin, Gutenberg, Cristoforo Colombo... Cristoforo Colombo, ni parolu iom pri li ! Sinjoro kiu havas nur la meriton esti stariginta ovon sur ĝia pinto... kaj tio ĝin rompante ! Sed sufiĉas manĝi ovojn en ŝelo por tio ! Mi tion faris dudek foje, mi... mi starigos la ovon sur ĝia pinto... kaj plie, ne rompante ĝin... Vi dubas pri tio ? Donu al mi ovon kaj ovingon, kaj vi tuj vidos... Sed kiu ajn ekvilibristo faros ĵon-

glajojn dekfoje pli malfacilaj ! li turnigos globon sur la ekstremaĵo de vergeto, li... Cristoforo Colombo ne estus tion farinta ! Vi bone vidas, ke tio ne malebligas lin esti fama...

Jes, mi scias, ke li ankaŭ eltrovis Amerikon !... Sed kio ? ĉar ĝi ekzistis, li nur bezonis iri tien ! Vi kredas, ke mi ne estus eltrovinta ĝin, mi ? Ha, nu, kiel tio estas malfacila ! Estas vaporŝipoj, kiuj vin kondukas tute rekte.

Jes, sed tiam vi trovas personojn, kiuj diras al vi : « Permesu ; por Cristoforo Colombo, Ameriko estis nekonata, tiam estis eltrovaĵo ! » Nu, kio ? Vi eble kredas, ke mi ĝin konas, mi ? Tiam, laŭ tiu rezono, se mi tien irus... estus eltrovaĵo ? Estas malspritege ! Jes, mi bone scias, ke oni respondos al mi : « Ho ! pardonon ! Sed Cristoforo Colombo estas la unua Eŭropano, kiu metis la piedon sur Amerikon ! » Nu, tiam, la unua Amerikano, kiu estis rekondukata en Hispanujon... li do eltrovis Eŭropon, tiamaniere ? Vi vidas, ke tio ne povas esti rezonata. La homoj estas malspritaj, malspritaj, malspritegaj ! Ne parolu al mi pri tio ! vidu, mi suferas !

Estas kiel Parmentier... nomo de franca supo ! kial li estas konata, mi petas ? Ĉar li

kunportis terpomojn ! Estas tre ruze ! Sed mia servistino tion faras ĉiufoje, kiam ŝi iras al la vendejo ! Nu, kio ? Kion tio pruvas ? Ke li ŝatis ilin ! Tiam li kunportis kelkajn ; estas tute nature ! Kiel mi, kiam mi revenas el Anglujo, mi kunportas viskion... Kaj mi ne petas, ke oni starigu al mi statuojn pro tio ! Estas mirige, kiel kelkaj homoj estas famaj pro preskaŭ nenio.

Nu, imagu ke, antaŭ ne longe, mi parolis pri tio al unu el miaj amikoj... botanikisto kiu estas en medicina lernejo ; nu ! li opinias ke Parmentier estas famulo ! Ankoraŭ spritulaĉo, tiu botanikisto ! Ĉu vi kredus, ke li eĉ ne konas la diversajn specojn de terpomoj ! Mi demandis lin pri la diferenco inter la terpomoj je butero kaj la frititaj terpomoj... li neniam povis tion diri al mi... kaj oni nomas lin botanikisto... !

Ne, sed por reveni al tio, kion ni diris... ankoraŭ intrigulo estas Franklin...

Fine, kial li estas fama ? ĉar li eltrovis la fulmoŝirmilon ? Bone ! kio estas fulmoŝirmilo ?... Ilo kiu devas vin ŝirmi kontraŭ la fulmo. Nu ! Prenu tri domojn... metu sur unu el ili fulmŝirmilon... faligu la fulmon... estas ĉiam sur la fulmŝirmilon, ke ĝi falos ! Nu ! Kaj ĉu vi ne kredas ke estas moki la homojn,

tio ? Ha, ne, la homoj estas malspritaj, malspritaj, malspritegaj ! Ne parolu al mi pri tio ! vidu, mi suferas !

Ankaŭ ekzemple la pentristoj... kial oni igas ilin famaj ?... ĉar ili bone scias pentri !... ne ! sed estus ridinde, se ili tute ne scius pentri !... Nu, kio ? Kion tio pruvas ? Ke ili havis bonajn profesorojn... ĉiu povas ilin havi ! Sufiĉas pagi la taŭgan prezon ! Ekzemple, mi, se mi estus lerninta, mi havis grandajn inklinojn, por la pentrarto. Pro tio oni min metis ĉe fotografiston, sed tie mi ne restadis, ĉar pri la arto mi havas miajn principojn.

Tiel, mia filo volis esti verkisto... mi lin malhelpis. Mi diris al li : « Mia filo, mi komprenas, ke oni skribas por la teatro, kiam oni estas nomata Molière, Shakespeare aŭ Schiller ! » Vi ne scias, kion li respondis al mi : « Sed, mia patro, ili ne estis ĉiam nomataj Molière, Shakespeare aŭ Schiller ! » Estas naivege. « Sed ĉiam filo mia !... de ilia naskiĝo ! » Tiam li kredis min embarasi, dirante al mi : « Tamen, se iliaj gepatroj estus malhelpintaj ilin skribi... ? » Sed mi respondis al li : « Filo mia, estu certega, ke iliaj gepatroj estus malhelpintaj ilin skribi... se ili ne estus nomitaj Molière, Shakespeare aŭ Schiller ! » Tio lin mutigis ! Bum !

Tamen, se nur mi havus nomon... mi ja havas unu, mi estas nomata Merkuro ! sed se mi havus konatan nomon... Ha ! vi vidus, kiom mi estus fama... Mi tuŝetis tiom da fojoj la famecon !... Nu... Ekzemple... la fervojoj !... Pro mi oni ilin havas ! Iam... mi estis juna !... mi iris por vespermanĝi ĉe amikojn sur la kamparon !... Tie estis Stephenson ! Mi diris dum la vespermanĝo : « Dio mia ! Kiom estas lacigaj la ĉevalveturiloj ! Oni ja devus trovi ion pli rapidan kaj pli oportunan !... » Tri jarojn poste, Stephenson eltrovis la lokomotivon ! Jen ! Kiom tio estis malfacila ! Estis mi, kiu donis al li la ideon... la unuan ideon ! Nu, li estas fama, kaj mi, neniu konas min. Oni eĉ rifuzis al mi la senpagan trairon sur ĉiuj fervojoj ! Oni diris al mi : « Kiam vi estos deputato ! » Kia estas la rilato, mi petas ?

Ĉu vi volas ankoraŭ pli proksiman ekzemplon ? Aŭskultu ! Doktoro Zamenhof ! kial do li estas fama ? Ĉar li eltrovis Esperanton ; kaj kio estas Esperanto ? Lingvo, farita per vortoj ĉerpitaj el ĉiuj naturaj lingvoj, por ebligi al ĉiuj kiuj ĝin konas, interparoli ne estante komprenataj de aliaj personoj ! Kiom tio estas malfacila !...

Sed mi, kiu parolas al vi, mi eltrovis jam

de longe lingvon... kiun la nekleruloj ne povas kompreni... kaj ĝi estas multe pli facila ol Esperanto, kiun oni proklamas kiel mirindaĵo de simpleco. Oni ĝin nomas *« javanezo »*, mian lingvon, kaj ĝi povas esti ellernata post tri minutoj ! Tio mirigas vin, ĉu ne ? Ankoraŭ pli nekredeble ! Oni povas uzi ĝin por ĉiuj naturaj lingvoj !... Aŭskultu...

Mia lingvo konsistas el unu sola afikso AV, kiun oni metas antaŭ ĉiun vokalon !... Estas ĉio... ĉio...

Ĉu vi povus eltrovi ion pli simplan ? Ekzemple :

Angle : Good morning.
Ĵavan-angle : Gavood mavornaving.
France : Bonjour, Monsieur.
Ĵavan-france : Bavonjavour, Mavonsavieur.
Germane : Guten Morgen.
Ĵavan-germane : Gavutaven mavorgaven.
Hispane : Buenos dias.
Ĵavan-hispane : Bavuavenavos daviavas.
Itale : Buon giorno.
Ĵavan-itale : Bavuavon ĝaviavornavo.
Oni eĉ povas paroli en Esperanto :
Bonan tagon, gesinjoroj.
Ĵavan-esperante : Bavonavan tavagavon, gavesavinjavoravoj !

Ĉu ne estas mirindege ?

Nu ! Zamenhof estas fama, eĉ famega, kaj mi nekonata...

Tial, mi bone scias, kion mi faros... Mi ne plu eltrovos ion ! Mi ne plu diros ion !... Oni ne povos preni ion al mi... kaj vi vidos la progreson !...

Ha ! ne ! la homoj estas malspritaj, malspritaj, malspritegaj ! Ne parolu al mi pri tio ! vidu, mi suferas !

LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO

15, Rue Montmartre — PARIS (1er Arr.)

(Aldoni 10 °/o por la sendelspezoj. — Ajouter 10 °/o pour frais d'envoi)

I. — MONOLOGOJ

1. — Originale verkitaj (Originaux)

PRUDENT (F-ino O.). — La Fratinoj (por knabinoj) 0 75
(En la 8-a numero de « Tra la Mondo ».)

PUJULA Y VALLES (F.). — La pipamanto. . 0 50
(En la 3-a numero de « La Revuo ».)

PUJULA Y VALLES (F.). — La senhejmulo . 0 50
(En la 6-a numero de « La Revuo ».)

PUJULA Y VALLES (F.). — Okaza artisto. . 0 50
(En la 9-a numero de « La Revuo ».)

ROKSANO. — La unua tago de mia dek-oka jaro (monologo por junulinoj) 0 75
(En la 10-a numero de « Tra la Mondo ».)

2. — Tradukitaj el la franca lingvo (traduits du français)

479. BILHAUD (P.) — Solo de fluto (monologue comique) ; trad. F. Doré 0 60

COLLIAS. — La duonokulvitro (trad. A. Boissac) 0 75
(En la 5-a numero de « Tra la Mondo ».)

489. JOUY (J.). — La benkoj de la promenejo (amuza tedmonologo, tradukita de P. Corret). . . 0 20

MAUREVERT (G.). — La bano de Sinjoro la Pastro (tr. P. Boulet). 0 75
(En la 1-a numero de « Tra la Mondo ».)

II. — KOMEDIOJ KAJ TEATRAĴOJ

1. — En franca lingvo pri Esperanto (en français sur l'Esperanto)

360. CART (Th.). — Une heure d'Esperanto . . . 0 50
(2 sinjoroj, 1 sinjorino aŭ 3 sinjoroj.)

367. DE MÉNIL (F.). — L'Héritage Klodarec. . . 0 75
(5 sinjoroj, 3 sinjorinoj.)

2. — En Esperanto :

A. — Originale verkitaj
(Littérature espérantiste originale)

555. PAILLOT (R.) — Bonegaj Atestoj, unuakta proza komedio 0 50
(3 sinjorinoj.)

451. VALLIENNE (S-ino). — La gasto (duakta komedio) 0 50
(3 sinjoroj, 2 sinjorinoj.)

B. — Angla literaturo.

466. BYRON. — Ĉielo kaj Tero (trad. D-ro Noël). . 1 35
94. — Kain (trad. Kofman) . . . . . 2 »

552. DICKENS (Ch.) — Bardell kontraŭ Pickwick, proceso eltirita el la romano « Pickwick Papers » ; trad. William Morrison 0 70

468. GOLDSCHMIDT. — Ŝi kliniĝas por venki (triakta komedio, trad. A. Motteau) 2 75

584. MADDISON MORTON (J.). — Boks kaj Koks (unuakta komedio, trad. Ch. Stewart) . . . 0 70
(2 sinjoroj, 1 sinjorino.)

469. SHAKESPEARE. — Hamleto (trad. L. Zamenhof) 2 »
470. — Julio Cezaro (trad. D-ro D. H. Lambert . . . . 2 »
472. — La Ventego (tr. A. Motteau) 2 75

471. STEWART (M. A.). — La Antaŭdiro (duakta komedio) 0 70

C. — Franca literaturo

115. BEAUMARCHAIS. — Edziĝo de Figaro (unua akto, trad. Kofman kaj L. de Beaufront). . 1 50

BERR DE TURIQUE. — La du haroj de l'okazo (duakta komedieto, trad. F-ino J. Flourens).
(2 fraŭlinoj). 0 75
(En la 5-a numero de « Tra la Mondo ».)

480. BRUEYS et PALAPRAT. — Advokato Patelino (trad. J. Evrot) 0 75

483. COURTELINE (G.) — Sinjoro Badin (unuakta komedieto, trad. R. Beck kaj R. Jean).
(3 sinjoroj) 0 25

487. D'HERVILLY (E.). — La Supujo (komedieto, trad. Samuel Meyer) 0 40
(2 sinjoroj, 1 sinjorino.)

485. FLORIAN. — Du biletoj (trad. H. J. Bulthuis kaj L. Touchebeuf) 0 40

491.	LABICHE et LEGOUVÉ. — Cikado ĉe formikoj (unuakta komedio). (*3 sinjoroj, 2 sinjorinoj*)	0	60
495.	MOLIÈRE. — L'Avarulo (trad. Samuel Meyer)	0	75
496.	— Don Juan (trad. E. Boirac, rektoro de la Akademio en Dijon)	1	50
497.	— Edziĝo kontraŭvola (trad. V. Dufeutrel)	0	60
501.	RACINE. — Esther' (trad. D-ro Noël)	1	25
502.	— Athali' (trad. D-ro Noël)	1	50

D. — Germana literaturo

464.	SCHILLER. — Wilhelm Tell (trad L. Meier) .	2	»

E. — Greka kaj Latina literaturo

506.	ARISTOPHANE. — Plutos (komedio, tradukis D-ro Noël)	1	25
512.	PLAUTE. — Rudens' (kvinakta komedio, trad. D-ro Noël)	1	50

F. — Hispana literaturo

476.	MORATIN (L. F.). — Kuracisto per batoj (hispana traduko de la « Médecin malgré lui » de Molière, tradukita Esperanten de Vincente Inglada)	0	50

G. — Itala literaturo

509.	DE AMICIS (E.) — La floro de l'pasinto (unuakta dramo, trad. S-ino R. Junck)	1	50

H. — Rusa literaturo

553.	GOGOL (N.-V.) — La Revizoro, komedio en kvin aktoj ; trad. L. L. Zamenhof	1	50
75.	PUŜKIN. — Boris Godunov (trad. Devjatnin) .	2	50
84.	— Ŝtona Gasto (trad. Borovko). . .	1	»
92.	TOLSTOJ. — Unua Brandfaristo (trad. Burenkov)	1	»

Mendu la **Ĝeneralan Katalogon** (*lernolibroj, propagandaj broŝuroj, diversaj verkoj*), la **Specialan Katalogon** (*verkoj maloftaj kaj lernolibroj en lingvoj aliaj ol la franca*) kaj la **Muzikan Katalogon.** Tiuj katalogoj estas sendataj senpage.

Demandez le **Catalogue général** (*livres d'étude, brochures de propagande, ouvrages divers*), le **Catalogue spécial** (*ouvrages rares et livres d'étude en langues étrangères*) et le **Catalogue de Musique espérantiste.** Ces catalogues sont envoyés franco.

364-8-07. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

ÖNB
+Z81548104

864-8-07. — Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris